



MiA MASI №5/9

Majo-2018

Informfoliaro de Moskva Esperanto-Asocio MASI
<https://miamasi.weebly.com>

ENHAVO

Paĝo 1_Enhavo de la numero

Aktivado: AMO-44/AMo.RU

Paĝoj 2-4_Trejnado: **FLAM-analizo**+EKEK-solvoserĉado. Kio ĝi estas? Kiel ĝin organizi? FLAMo dum nia AMO). — **Irina Gonĉarova**. Protokolo — **Kirill Noviĉenko**
Paĝoj 2_Ĵurnalo “**Kontakto**” pri AMO en Jerŝovo.

Informado: Lingvaj festivaloj kun MASI-subteno

Paĝo 5_7-a Lerneja Lingva Festivalo en Kalugo. — **Irina Gonĉarova**

Paĝo 6_4-a Lingva Festival en Iĵevsko: fore, sed kune. — **Irina Gonĉarova**

Paĝo 7_Esperanto per praktiko: Poŝtkruciĝo nun kaj ĉi tie. — **Mirina**

Instruado: FaRo

Paĝo 8_Legendoj kaj ties evoluigo: **Elvirina Timiro**. Parto 2.

Praktikado: Vojaĝoj

Paĝoj 9-10-11_11-a Mezorianta Esperanto-Kunveno_Marakeŝ, Maroko. — **Aleksandr Lebedev**

Niaj projektoj

Nova ideo: LOKALIZU

Paĝo 12_LOKALIZU: teama tradukarto. — **Aleksandr Basov**

Paĝo 12-13_Enkonduka LOKALOZU-kunveno. — **Aleksandr Basov**

Esperanto: Первый канал

Paĝo 13_Intervjuo: **Valentin Seguru**_RET-2017_Video 8

Paĝo 13_Intervjuo: **Ĉesko** kaj **Petro**: poliglitoj.

Esperanto-Poŝtkruciĝo

Paĝo 14_Aprila informletero de EoPK: Pli bone malmulte, ol senrezulte. Precizigo de la lotum-adresaro. — **Mirina kaj Markus**

Paĝo 14_Premioj por la unuajaraj EoPK-rekorduloj.

Paĝo 14_Denove pri la konkurso de Markus.

Paĝo 15_Ni salutu per bildkartoj aperon de nova ZEO!

Paĝo 16_Nia amika subteno kiel socia helpo. — **Mirina**

Amika Rondo: VsPLESk-18

Paĝoj 17_Kio estas VsPLESk. Fotoj. — **Mirina**

Paĝoj 18_Fotoj. — **Scianta**

Niaj Homoj: Aprilaj naskiĝintoj

Paĝo 19_12.04 — Naskiĝtago de **Tatjanjo** (**Tatjana Mojnĵakova**)

Paĝo 19_19.04 — Naskiĝtago de **Oĉjo** (**Oleg Ĉajka**)

Paĝo 19_23.04 — Naskiĝtago de **Spertanto** (**Pavel Dolgopolov**)

NIA VERKARO

Paĝo 20_Oĉjo jubileas

Anonco: RET-2018

Paĝo 21_2-a Informltero

Paĝo 22_Kalendaro por majo

Paĝo 22_Vizitkarto de MEA MASI

AKTIVADO

AMo-44 AMo.Ru

Ni daŭrigas priskribon de **AMo-44**, aŭ **AMo.Ru** — la seminario “**Aktivula maturigo**”, iniciita de **UEA** kaj antaŭ **APERo-12** — de **MEA MASI**. Rakonto pri la unua labora kunveno troviĝas en la aprila numero de nia informfoliaro (**MiA MASI-4/8-2018**, p.?). La duan labortagon de AMo komencis la trejnado “**Kio estas rusia esperantistaro kaj kia estu ĝia estonto**”, pasinta en la konata inter Esperanta aktivularo maniero de **FLAM-analizo**.

FLAMo: kio ĝi estas

FLAM-analizoj permesas pritakson de difinita situacio por trovi ĝiajn pozitivajn kaj negativajn aspektojn. Tion oni faras traktante kvar kategoriojn:

Fortoj: ene de la koncerna organizaĵo

Lamaĵoj: ene de la koncerna organizaĵo

Avantaĝoj: ene de la ĉirkaŭanta socio, kie agas la organizaĵo

Minacoj: ene de la ĉirkaŭanta socio, kie agas la organizo

Do, **Fortoj** kaj **Lamaĵoj** temas pri faktoroj, kiujn la **esperantistoj povos mem regi** aŭ influi. Kontraste **Avantaĝoj** kaj **Minacoj** temas pri faktoroj, kiujn la **esperantistoj** apenaŭ povas influi aŭ ŝanĝi, sed kiujn ili **nepre devas atenti kaj kompreni**, ĉar ili trudas sin el la ĉirkaŭaĵo, en kiu esperantistoj devas agi.

Analizado konsistigas nur la komencajn fazojn — necesas plue labori cele **trovi vojojn por solvoj**. Oni faras tion laŭ la sekvaj temoj:

Evoluigi la **Fortojn**

Kuraci la **Lamaĵojn**

Ekspluati la **Avantaĝojn**

Kontraŭi (aŭ mildigi) la **Minacojn**.

Laŭ la komencaj literoj la solvoserĉa ekzerco nomiĝas **EKEK**.

FLAMo: kel ĝin organizi

La laboro ĉefe okazas en **grupetoj** kaj celas **diskutadon**, tiel ke ĉiu havu paroleblon kaj la konkludoj venu el resumo de la opinioj. En ĉiu grupo estas **protokolanto**, kiu pretigas skriban resumon. Se abundas tempo, ĉiu grupo povos trakti ĉiujn temojn. Se

tempo premas, estu **kvar grupoj**, ĉiu traktu nur unu el la temoj de FLAMo kaj poste — iun (eble, la paran) temon de EKEK (laŭ la komuna decido). Fine de la grupa laboro (post FLAMo kaj post EKEK) okazas **kunaj sesioj** — por tuj kapti la trovaĵojn.

Dum la kunaj sesioj la rezultoj **estas skribitaj liste** sur granda spaco, ĉiu ideo estas formulita per 6–12 vortoj. Pli detalajn konsiderojn eblas noti suplemente al la listigo kaj **poste trakti**. Sekvas komunaj pridiskutoj kaj **kuna finredaktado** de la listoj.

FLAMo dum nia AMo

21.02.2018, AMo-44_AMo.RU-1

Tempo: “Kio estas rusia esperantistaro kaj kia estu ĝia estonto”.

Celo: trovi vojojn por junigi kaj modernigi la movadon en Rusio.

Tagordo:

11:00–12:00 **Parto 1. FLAM-analizo:** Kio estas la nuna rusia esperantistaro.

12:00–12:15 Kafopaŭzo.

12:15–13:15 **Parto 2. EKEK-solvoserĉado:** Kiel plibonigi la situacion en Rusio.

13:15–13:45 **Parto 3. Resumo de la tuto. Konkludoj.** Preparo de la protokolo.

Protokolo

Gvidanto: **Irina Gonĉarova** (MEA MASI, estrarano de REU)

Protokolanto: **Kirill Noviĉenko** (Sankt-Peterburgo, EK “Kariljono”)

Ĉeestis: **P. Fedosov** (MEA MASI), **I. Gorodeckaja** (u. Novoĉerkassko), **N. Gudskov** (Moskvo, estrarano de REU), **G. Kevorkjanc** (MEA MASI), **R. Kudrjavceva** (u. Jekaterinburg), **A. Lebedev** (MEA MASI, estrarano de REU), **T. Moĵnjakova** (MEA MASI), **S. Smetanona** (Moskvo, estrarano de REU), **V. Spicina** (u. Volgograd), **A. Zingerman** (MEA MASI).




Paso de la trejnado

Irina klarigas **esencon** de FLAM-EKEK. Estis proponite ĉiufoje labori kun aliaj partneroj.

Startas FLAMo.

Estis formigitaj **2 grupoj** (**Fortoj** kaj **Lamaĵoj**), unu el kiuj pritraktas **fortajn** trajtojn de Esperantujo en Rusio kaj la alia grupo faras la samon pri malfortaj trajtoj (= **lamaĵoj**). Okazis **interŝanĝo de rezultoj** por aldoni opiniojn de alia grupo al la propraj.

Rezultiĝis la jeno.



Fortoj de la Rusia E-movado:

- Reprezenteco en internaciaj E-instancoj
- Ekzisto de organizita movado (*REU, MEA MASI, Ural-Siberia komunumo*)
- Riĉa historio de landa E-movado
- Tradiciaj aranĝoj
- Akceptado de eksterlandanoj
- Multaj spertuloj kun alta lingvonivelo
- Multaj verkemuloj
- Fortaj eldonejoj
- Sufiĉe da lerniloj
- Bonaj vortaroj, inkluzive fakaj
- Simpleco de E-lernado por rusoj
- Apero de E-paĝoj en la reto

Lamaĵoj de la Rusia E-movado:

- Troa forto de la angla lingvo
- Malbona kono pri Esperanto tra la lando
- Por neesperantistoj ne klaras avantaĝoj de Esperanto
- Manko de interesiĝantaj gejunuloj
- Pasiveco de interesiĝantoj
- Pasiveco de klubanoj, konsumeca konduto
- Malalta konsumado de E-verkaĵoj kompare al ĝia produktado
- Foresto de kontaktoj inter kluboj
- Ege malforta regiona agado
- Manko de komunaj projektoj kaj celoj por regionoj kaj la tuta lando
- Manko de karismaj fortaj organizantoj
- Malmultaj instruistoj kaj ilia neorganiziteco
- Ne ekzistas aparta junulara Movado kaj ĝi ne emas reaperi
- Ne estas specialaj aranĝoj por gejunuloj
- Malintereso de REU al unuopuloj
- Malforta partopreno en neesperantaj aranĝoj por promocio E-on al eksteruloj
- Malvasta uzado de amaskomunikiloj
- Manko de ruslingvaj materialoj en eldonaĵoj
- Manko de uzado de modernaj teknologioj
- Manko de financoj; ne ekzistas subvencipetado

Estis formitaj **du alikonsistaj grupoj** (Avantaĝoj kaj **Minacoj**) por pridiskutado de **eksteraj faktoroj**, kiujn esperantistoj ne povas ŝanĝi aŭ influi, sed devas kompreni kaj konsideri.

Avantaĝoj jenas:

- Apero de intelekta elito en junulara medio
- Pli da socia aktivado kaj junulara volontulado
- Eblo labori kun amaskomunikiloj
- Eblo uzi senpagajn ejojn
- Eblo kunagi kun aliaj nekomercaj organizaĵoj, organizi aranĝojn en infanaj organizaĵoj
- Ekzisto de minoritataj lingvoj protektindaj, kies adeptojn pli facials interesigi pri Eo
- Grandega lando (senproblema vojaĝado tra diverseca teritorio kun abundaj vidindaĵoj)

Minacoj jenas*:

- Grandeco de la lando (kosto de vojaĝoj, distancoj)
- ~~Malatento al la Movado flanke de registaro~~
- ~~Manko de ŝtata subteno~~
- ~~Kutimaj E-projektoj ne estas profitdonaj~~
- Malfacila partopreno en internaciaj aranĝoj (kosto, vizoj)
- Nevolo de homoj partopreni en fortpostulaj eventoj
- Ekonomika situacio ofte postulas aldonajn perlaborojn, kio ne lasas tempon kaj forton por kromaj okupoj
- Abundaj kromaj ŝatokupoj
- Malkresko de ĝenerala klera nivelo de junularo (transmetita **el Lamaĵoj** — Red.)
- Dominado de la angla
- ~~Nekompreneo de praktika uzado de E-umado~~
- ~~Ne estas Rusia E-urbo~~
- ~~Politika propagando kontraŭ Rusio, malhelpanta al internaciaj rilatoj inter esperantistoj~~

***Redaktante** la protokolon, **la gvidanto forstrekis la punktojn, kiuj ne respondas la postulon de la tasko, nome, ke esperantistoj ne povas influi aŭ ŝanĝi la situacion.** Ĉiuj forstrekitaĵoj devus trafi la liston **“Lamaĵoj”**. Sube estas metitaj la forstrekaj tezoj kun **pliaj komentoj** de la redaktanto.

1/ Malatento al la Movado flanke de registaro

Antaŭ ol aserti tion necesas **provi allogi atenton** de la registaro al E-movado (se tio vere necesas). Ĉu tiuj provoj jam estis faritaj kaj fiaskis? Kiom klare motivitaj kaj argumentitaj ili estis? Kiom oftaj kaj persistaj? Se seriozaj provoj ne estis, **ne eblas scii**, ĉu esperantistoj povas aŭ ne povas influi la situacion.

2/ Manko de ŝtata subteno

Kio estas tio? **Ĉu iu iam petis subtenon**, kiun? Ĉe kiuspecaj petoj oni ne ricevis subtenon? Se seriozaj provoj ne estis, **ne eblas scii**, ĉu esperantistoj povas aŭ ne povas influi la situacion.

3/ Kutimaj E-projektoj ne estas profitdonaj

Kio/kiu kulpas? De kio/kiu tio dependas? Grandparte — de (mal)kapabloj de mem rusiaj esperantistoj organizi profitdonajn projektojn, ĉu kutimajn, ĉu nekutimajn. En la mondo estas ekzemploj de profitdonaj E-projektoj. Do, tiu ĉi punkto devas iri al la **Lamaĵoj**, sed ne al nedependaj de mem esperantistoj minacoj.

4/ Nekompreneo de praktika uzado de E-umado

Ĉu esperantistoj ne povas influi la situacion? Certe, povas, sed estas ellaborita nek metodo, nek strategio, nek planado, nek gvidado por fari tion. Do, tiu punkto transmitendas al la **Lamaĵoj**.

5/ Ne estas Rusia E-urbo

Ĉu E-urbo povas aperi **sen penoj** flanke de **esperantistoj**? Kompreneble, ne. Denove — al la **Lamaĵoj**, sed ne al neinflueblaj obstakloj.

6/ Politika propagando kontraŭ Rusio, malhelpanta al internaciaj rilatoj inter esperantistoj.

Politika propagando estas **reciproka**: same Rusio propagandas kontraŭ aliaj landoj. Ĉu tio helpas aŭ malhelpas internaciajn rilatojn inter esperantistoj — **dependas nure de esperantistoj mem**. Politika propagando estas **lamaĵo**, malfacilaĵo, sed esperantistoj ene de sia komunumo, inter si mem povas kaj devas ŝanĝi la situacion. Do, ankaŭ tiu punkto — al la **Lamaĵoj!**

Kafopaŭzo

Startas EKEK. Partoprenantoj disdividiĝas je **4 grupoj**.

Grupo EF: Kiel Evoluigi la Fortojn de la Rusia E-movado

- Proponi al **spertuloj** kun alta lingva nivelo okazigi aranĝojn kaj esti **retaj konsilantoj** por novuloj.
- Pri la **riĉa historio** de la Rusia E-movado indas okazigi **prelegojn en la rusa** lingvo kaj fari **filmon** pri la temo.
- En eldonaĵoj aperigi **artikolojn en la rusa** kaj en **facila Esperanto** por interesigi neesperantistojn kaj allogi komencantojn legi la eldonaĵojn.
- Lerniloj multas, sed **ne estas metodiko**. Proponi al instruemuloj konkretajn metodikojn por helpi ilin instrui kaj gvidi kursojn.
- Indas instrui instruistojn uzi **avantaĝojn de la rusa lingvo por instruado** de Esperanto.
- Bona disvolviĝo de **vortaroj** estas jam plenumata kaj eblas subteni tion ne nur per mono, sed ankaŭ per **spertoj** de samideanoj.
- Indas inviti **verkemulojn** al aranĝoj kaj **proksimigi** ilin al simplaj partoprenantoj.
- Indas uzi modernajn aplikaĵojn. Uzi **Amikumu**-n por trovi hazardajn gastojn. **Kapti grandajn internaciajn evenojn** en Rusio (kiel futbala mondkonkuro) kaj serĉi venintajn esperantistojn.

Grupo KL: Kiel Kuraci la Lamaĵojn de la Rusia E-movado

- Povus helpi **komunaj grandaj programoj**. Tio estas bezonata por aktivigi **regionojn**. Ekzemple, programo pri informado. Gravus fari programon por aperiĝo en blogosfero. Indas promocii komunajn projektojn **per sociaj retoj**.
- Indas **alvoki pasivulojn**, por ke ili partoprenu en programoj kaj agadoj.
- Indas trovi taŭgajn instruistojn kaj prizorgi ilian laboron, proponi renovigi kursojn kaj **aktivigi malaktivajn instruistojn**.

Grupo EA: Kiel Ekspluati la Avantaĝojn

- Indas inviti gastojn kaj pretigi **ĉiĉeronojn**. Traduki tekstojn pri turismaj vidindaĵoj. Indas iamaniere trovi kaj esplori, **ĉu venos esperantistoj** okaze de **ĉampionato pri futbalo**.
- Necesas serĉi **surloke ejojn** kaj lokojn kie eblas okazigi aranĝojn. Tiuj lokoj devas liveri taŭgajn kondiĉojn.
- Indas kontakti **lingvajn minoritatojn** en regionoj de Rusio.

Grupo KM: Kiel Kontraŭi (mildigi) la Minacojn

- Grandeco de la lando liveras ankaŭ avantaĝon. Indas fari **apartajn regionajn agadojn**. Tio ebligas varti lokan movadon pli efike. Eblas okazigi **tutlandajn interretajn aranĝojn**, por kiuj distancoj ne ekzistas.
- **Malatento flanke de la ŝtato** povas esti traktata ankaŭ kiel granda **avantaĝo**.
- Estas homoj, kiuj uzas Esperanton en komercado (Peter Balaŝ). Indas **esplori ilian sperton**. Multaj homoj faras diversajn **ne nur pro mono**.
- Studentoj havas eblojn vojaĝi al aranĝoj **senpage**. Estas sukcesaj ekzemploj de projektoj de MASI pri kunlaboro kun universitatoj tiurilate. Indas **serĉi eblojn por vojaĝi pli malmultekoste**, lerno-programojn, uzi la Pasportan Servon, petveturadon ks.
- Pri dominado de la angla. Indas trovi **avantaĝojn**, kiujn Esperanto donas **malsame de la angla**. Indas promocii Esperanton **pare kun la rusa**. Necesas sciigi al homoj, ke ni ne celas anstataŭigi la anglan, Esperanto estas paralela **helplingvo**.
- Okazigo de la Rusia E-urbo dependas de entuziasmoj. Eble per interesigo de urba administracio en turismo oni povos lanĉi ĉi-procezon.
- **En ĉiu lando sendepende de politika situacio eblas trovi geamikojn**.

Resumo de la tuto. Konkludoj

Resumo de la tuto estas respugulita en la **Protokolo**.

La partoprenintoj konkludas, ke la farita laboro estis tre **utila** por ĉiu el ili kaj por komenco de la vasta traktado de la problemoj en la Rusia Esperanto-Movado. Tamen ni konscias, ke la protokolitaj resumoj estas nur opinio de la partoprenantoj kaj ne povas esti gvida dokumento. **Ĉiu temo bezonas plian pridiskutadon** en pli vasta (aŭ en alia) konsisto, sur diversaj organizaj niveloj: en la **REU-Estraro**, en **REU-Konferencoj**, en komunaj rusial kunvenoj (kiel **REToj**), en la **regionoj**, en la **kluboj** kaj eĉ **individue**.

La partoprenantoj de AMo.Ru komisiis al REU-Estraro organizi la pridiskutojn laŭ la modelo de la priskribita trejnadado "FLAM-EKEK" en Rusia Esperantujo.

Preparo kaj **akcepto de la protokolo** dum AMo ne okazis.

Karaj rusiaj esperantistoj!

FLAM-EKEK estas oportuna metodo por strukturigi nian movadajn planojn. **Organizu kun viaj samklubanoj** pridiskutojn de la Esperanta situacio en via urbo, trovu **vian specifojn**, estu maksimume **konkretaj** en viaj analizoj kaj konkludoj. **Tio helpas al vi trovi ĝustajn agadpaŝojn kaj vidi perspektivojn.**

Unuopaj esperantistoj, kiuj emas promocii Esperanton aŭ evoluigi la Movadon en sia teritorio, povas fari tion eĉ sole.

Redakcio de MiA MASI volonte aperigos viajn konkludojn sur siaj paĝoj!

INFORMADO

Lingva Festivalo: Kalugo

21.04.2018

Festivala printempo daŭras. La 21-an de aprilo okazis en Rusio tri lingvaj festivaloj: en Ijevsko, Kalugo kaj Samaro. Pro organizaj problemoj en Ijevsko la dato de tiea LF koincidis kun tiu de Kaluga lerneja festivalo, kiun patronas MEA MASI. Ĝuste tien ni nin direktis.

Eterne juna Lingva Festivalo en Kalugo

Lerneja Lingva Festivalo jam dum 7 jaroj estas organizata de **Administrantaro pri klerigo de la urbo Kaluga** kaj de **Moskva Esperanto-Asocio MASI**. La festivalo en Kalugo estas destinita por lingvoŝatanta lernantaro el la urbaj mezlernejoj. Ĝi estas ido de la Moskva Lingva Festivalo, kiu kuraĝigis la urbajn klerigajn instituciojn okazigi la festivalon, **garantiante sian nepran organizan kaj enhavan helpon**. Tial ekde la unua Kaluga festivalo moskvanoj riĉigas la lokan programon per siaj kontribuoj, kaj la **nomo de MEA MASI staras sur la frontpaĝo de la festivala programfolio** kiel la dua organizanto.

Ĉi-foje estis, ŝajne, rekorda kvanto de fluparolantaj esperantistoj en la **10-homa moskva teamo**. Venis la **MASI-anoj Pjotr Fedosov** (prezento de Esperanto kaj prelego pri la rusa lingvo), **Ivan Sarkisov** (du ĝeneral-lingvistikaj prelegoj), **Tatjana Mojnjakova** (ludoj pri diverslingvaj proverboj) kaj **Irina Gonĉarova** (metiejo pri Esperanto-poŝtkruciĝo); el Sankt-Peterburgo venis eksMASiano **Kuzma Smirnov** (du prelegoj pri artefaritaj lingvoj kaj unu pri mistraktoj de lingvoj). Kiel gasto estis kun ni **Britta Loose-Vanjuŝkin**, germanino, nun loĝanta en Moskvo. Ĉiuj esperantistoj portis la konatan MASI-insignon "**Mi parolas Esperante**" – kio estas nemalbona populariga detalo. **Dum la Malfermo** mi salutis la festivalon de la nomo de la moskvaj organizantoj – MEA MASI, substrekinte **rolon de esperantistoj** en okazigo de lingvaj festivaloj, kaj **Parado de prezentantoj** ebligis menciojn pri E- programeroj.



Dum la ĉefa parto de la programo – **tri 40-minutaj blokoj po 15 eventoj en ĉiu** – ambaŭ Esperantaj studokupoj havis grandan sukceson ĉe la publiko.

La 13-jara **Petro Fedosov** prezentis Esperanton en tipa por li akademia maniero, mi okazigis surskribadon de belaj bildkartoj, sendendaj al la membroj de **Esperanto-poŝtkruciĝo** (vd p. ?).

Post la labora parto ĝojigis la publikon belega **koncerto** far' de arta studio "**Konstelacio**", kiu regule liveras talentojn al la TV-spektaĵo "**Voĉo: Infanoj**".

Dum la **Solena Fermo** la lokaj gvidantoj kaj persone, kaj publike laŭde menciadis **helpon flanke de MEA MASI kaj moskva festivala teamo**, kiuj tiom multe faras por la Kaluga LF. Ja el 30 festivalaj programeroj **17 estis faritaj de la moskvanoj**. Ni prezentis 5 lingvojn kaj 9 lingvistikajn prelegojn, gvidis 3 praktikaĵojn. Al MEA MASI estis enmanigita **Dankfolio**. Kompreneble, ni estis arde invitataj por la sekva jaro.

Eblas certi, ke ĉiuj ĉeestantoj forportis kun si pozitivan impreson kaj pri la festivalo, kaj pri la lingva fenomeno, uzata de moskvanoj por paroli, kiu nomiĝas **Esperanto**.

Irina Gonĉarova,
direktoro de Moskva Lingva Festivalo,
kunordiganto de MEA MASI



INFORMADO

Lingva Festivalo: Iĵevsko

21.04.2018

Irina Gonĉarova

4-a Lingva Festivalo en Iĵevsko: fore, sed kune

La 21-an de aprilo en la *Internacia Orient-Eŭropa universitato* de Iĵevsk — ĉefurbo de Udmurtio — pasis *la 4-a Lingva Festivalo*, subtenata de *MEA MASI*. La dato de Iĵevska kaj Kaluga festivaloj koincidis, tial moskvanoj ne povis ĉeeste partopreni la Iĵevskan festivalon. Tamen **ligo inter ni ne rompiĝis**: dum la preparado la organizantoj multe konsultis min.

Menciindas, ke pasintjare ni por la 12-a Moskva Lingva Festivalo sukcesis **organizi oficvojaĝon** kun pripago de la vojaĝkostoj **al du studentinoj** de *Udmurta ŝtata universitato*, kondiĉe ke ili ne nur prezentos la udmurtan lingvon, sed ankaŭ iĝos kunorganizantoj de la sekva lingva festivalo en Iĵevsko. Kun granda kontento ni konstatas, ke la junulinoj plenumis la promeson: *Anna Kadrova* kaj *Anastasija Pivovarova* sub gvido de kulturologo kaj lingva aktivulo *Aleksej Ŝklajev* formis la **organizan teamon** de la 4-a Iĵevska Lingva Festivalo kaj **eblogis ĝian sukceson**.

La festivalo imitis nian klasikan formaton, konsistis el **kvin 45-minutaj blokoj** kaj prezentis **20 lingvojn kaj 8 prelegojn**. Tri programeroj estis dediĉitaj al la **udmurta lingvo** kaj ĝia nuna stato. Dum la preparo de la festivalo ni, certe, speciale zorgis, ke estu prezentita ankaŭ **Esperanto**. Pri nia lingvo dufoje rakontis juna iĵevska esperantisto *Roman Mutin*.

Kelkajn tagojn antaŭ la festivalo Aleksej, la ĉeforganizanto, petis min sonregistri **salutvortojn por la Solena Malfermo**. Krom

kutimaj klarigoj pri rolo de Esperanto kaj esperantistoj en la historio de lingvaj festivaloj, mi emfazis gravecon de **atento al la udmurta lingvo** — gepatra por la loĝanta ĉi tie popolo. En naciaj respublikoj de Rusio la slogano pri **Esperanto kiel livgvo la dua post la gepatra** estas akceptata kun pli profundaj emocioj...

La sukceso de la 4-a Lingva Festivalo en Iĵevsko esperigas, ke lingvaj festivaloj sur la udmurta tero fin-fine stabiligis.



INFORMADO

Poŝtkruciĝo: LF en Kalugo

21.04.2018

Irina Gončarova

Kaluga LF:

Esperanto per praktiko

Inspirita de la sperto de la *Infana Spaco* dum *la 12-a Moskva Lingva Festivalo*, kie la unuan fojon estis organizita **metiejo pri kartosurskribado**, mi decidis ripeti la eventon "**Poŝtkruciĝo nun kaj ĉi tie**" en *la 7-a Lerneja Kaluga Lingva Festivalo*. La anonco, farita dum la Parado de lingvoprezentantoj, allogis 28 knabinojn, 1 knabon kaj 1 aĝulinon (de kie ŝi aperis en lernejana evento? ĉu instruistino?). Ni notu, ke neniu el la venintaj **gejunuloj vizitis la antaŭe okazintan prezentadon de Esperanto**, el kio ni sen troa certeco povas konkludi, ke **la gejunuloj venis pro la poŝtkruciĝo** (kaj promeso de umado kun belaj bildkartoj), **sed ne pro lingva intereso**.

La aranĝo superis ĉiujn bon-atendojn. **30 homoj** surskribis mane belajn poŝtkartojn, multaj faris tion **la unuan fojon en sia vivo**. Hazarde la geknaboj ricevis **novan praktikan sperton**. Evidentiĝis, ke ili scias surskribi nek tekstojn, nek adresojn, nenion komprenas pri afranko de poŝtkartoj per poŝtmarkoj ktp. Ankaŭ **pri Esperanto ili sciis nenion**.

Nun kaj ĉi tie — **neniu leciono** pri la lingvo, ne-ne, nur kelkaj klarigoj, kiel kopii la **kliŝan Esperantan tekston** sur la karton, kiel ĝuste **skribi sian nomon** (ja ekzistas iuj nekutimaj literoj. Esperanta **alfabeto** — jam sur la tabulo). Nature, ni komprenu, kion ni skribas, do, jen la **traduko**. Se iu scivolemas **pri gramatiko** de la skribataj frazoj — jen ĉiuj klarigoj sur unu paperfolio, **fotu kaj legu hejme** (temas pri elprintaĵo de la [instrukcioj por ruslingvaj neesperantistoj](#), dezirantaj partopreni **EoPK sen scio de la lingvo**). Se demandoj — levu la manon — mi venos helpi.

Tute **libera**, sed tamen tute **labora** etoso, multaj emoj kaj penoj fari ĉion ĝuste... Neniu ekdeziris preni de mi poŝtmarkojn, **ĉiuj volis mem** iri al la poŝtejo, mem afranki, mem enpoŝtkestigi sian bildkarton. Ni ne povas esti certaj, ke ĉiuj infanoj vere faris tion. Tamen kelkaj raportoj pri ricevo de la infanaj bildkartoj jam venis. Sed la plej **granda surprizo** estis, ke **kvar kalugaj knabinoj mem aliĝis al EoPK** en ties [paĝaro](#) — kaj kun entuziasmo komencis sendadi la poŝtkartojn en Esperanto, al esperantistoj. Kiu scias — eble, tio estos **ilia vojo al Esperanto**...



Proponi Esperanton kiel helpilon por realigo de aliaj ideoj, kiuj estas por junularo pli allogaj, ol lernado de "jam formortinta" lingvo — jen kiujn vojojn ni, popularigantoj de Esperanto, devas serĉi. Unu el ebloj estis trovita: metiejo pri poŝtkruciĝo per Esperanto. Venu kun belaj bildkartoj al **infanaj ripozejoj**, al someraj lernejoj — provu apliki mem!

Respondojn al ĉiuj organizaj demandoj vi torvos en la artikolo (*MiA MASI-1/5-2018, p.13*) pri la aranĝo, pasinta sur Infana Spaco dum MLF-12, en la paĝaro de Esperanta Poŝtkruciĝo <https://bildkarto.weebly.com/> kaj ĉe **Irina Gončarova** (mirinda.strigo@gmail.com).

Teksto de la mesaĝo por la bildkarto:

Kara (Nikol)!
Mi salutas vin el (Sankt-Peterburgo / Prostokvaŝino)!
Mi ne estas esperantisto,
sed mi ŝatas la ideon
de la poŝtkruciĝo.
Mi deziras al vi
pacon kaj feliĉon!
Amike – (Nataŝa)



INSTRUADO

Faru la Rondon!

Legendoj kaj ties evoluigo (parto 2)



En MiA MASI № 4/8 – 2018 (paĝo 10) ni klarigis, kio estas legendoj de la kursanoj, kaj por ekzemplo komencis publikigi eseojn de *Elja Bereĵkova*, la kursanino de FaRo-50. Laŭ la kursa legendo Elja estas *Elvirina Timiro*, tradukistino el Oro Preta (Brazilo). Ni memorigas, ke la eseojn ĉiu kursano verkas hejme, post ĉiu parola leciono pri la koncerna temo. Ni daŭrigu publikigon de la eseoj de Elja.

Mi ne povas deteni min de emzafo, ke la tekstoj estas korektitaj nek gramatike, nek stile.

Lec. 4 Kion mi ŝatas manĝi

Mi estas brazilano, tial por matenmanĝo mi preferas panon kun fromaĝo kaj brazilan kafon. Estas neimageble matenmanĝi sen papajoj kaj gujavo. Sed mi manĝas nek kaĉon, nek ovaĵon, kiel en aliaj landoj.

Por tagmanĝo mi elektas feĵoadon. Tio estas brazila manĝaĵo kion oni faras el fazeolo, kolbaso, porkaj ripaĵoj kaj maniokfaruno. Sed mi ne scipovas kuir ĝin, kaj mi iras al malgrandaj restoracietoj.

Vespere brazilanoj manĝas supon aŭ italajn pastaĵojn.

Sed mi volus rakonti ankaŭ pri nia tradicio de nutrado de oriŝaoj. Oriŝaoj estas spiritoj el la religio kandombleo. Mi estas "filino" de Jansan, la spirito de vento — ŝi ŝatas akaraĵejon, bataton dolĉan kaj kuiritajn pomojn, ĉu vi kredas?



Lec.5 Kion mi bezonas por mia laboro

Mi estas Elvirina Timiro, tradukistino el Brazilo. Mia laboro estas tradukado de beletro el la angla kaj la miranda en la portugala, kaj mi bezonas multajn aĵojn: tablon, seĝon, vortarojn, skribilon, kajeron aŭ notblokon, komputilon kaj printilon.

Kiam mi tradukas modernajn romanojn aŭ novelojn, mi bezonas aŭtorrajton, kaj kiam mi tradukas klasikan literaturon aŭ folklorajn verkojn, mi ne bezonas ĝin. Mi ankaŭ ĉiam bezonas redaktiston, korektiston kaj, certe, senton de lingvo!

Lec. 6 Kiun sezonon vi preferas kaj kial

Vi demandis, kiun sezonon mi ŝatas. Mi loĝas en Brazilo, kaj en mia lando neniam estas neĝo kaj frosto. Arboj floras dufoje en jaro, ekzemple, ĵabutikabo — en julio kaj en novembro, tio estas en vintro kaj en printempo, ja nia lando situas en la Suda hemisfero.

Mi tre ŝatas printempon. Estas nek tro varme nek malvarme, ne pluas kaj, certe, ne neĝas. Ĉie estas floroj, kaj en ĉielo — multe da birdoj: papagoj, tukanoj, hirundoj. Ĉu vi legis la fabelon de Ĵorĝi Amadu "Striita Kato kaj Sinjorino Hirundo", kiu komenciĝas printempe?



Daurigota

PRAKTIKADO

11-a Mezorianta Esperanto-Kunveno

30.03-05.04.2018, Maroko

Norden / Aleksandr Lebedev



Antaŭnelonge mi revenis el Maroko, kie pasigis 12 bonegajn tagojn, **turismante** en tiu ĉarma lando kaj **partoprenante** la **11-an Mezoriantan Esperanto-kunvenon**. Estas jam la dua MEK, kiun mi partoprenis; la unua estis pasintjare en **Kartvelio**. Kaj jam tiam, eksciinte, ke oni planas post jaro okazigi la sekvan kunvenon en Maroko, mi decidis vojaĝi. Ĉar mi antaŭlonge tre volis viziti Marokon kaj ekĝojis pri aperinta eblo esperantumi tien.

Ekzistas **nur unu flugkompanio**, kiu provizas rektajn flugojn inter Moskvo kaj Maroko. Tio estas **Royal Air Maroc**, kaj ĝiaj flugoj ligas la rusan ĉefurbon kun **Kasablanka** — ekonomia centro kaj la plej granda urbo de Maroko.

Do, la 28-an de marto post **6-hora flugo** mi atingis la flughavenon de Kasablanka. Ĉarmas, ke al la urbo mem eblas veturi de la flughaveno per trajno, same kiel en Moskvo. Atinginte la urban stacidomon, mi iris promeni tra la urbo direkte al mia hostelo, kiun atingis jam vespere.


La sekvan tagon mi multe vagadis tra **Kasablanka** (estas «**Blanka domo**» en la hispana), la unuan fojon en la vivo vidis oceanon — **Atlantikon**, penis kaj ne sukcesis viziti la plej grandan kaj solan viziteblan marokan **moskeon** (ial ĝi ne funkcias), manĝis en fama restoracio, vizitis la antikvan urboparton — **medinon** kaj vespere per trajno veturis al **Marakeŝo**.

Marakeŝo estas nun la plej turisma loko de Maroko. Krome, ĝi estis la dua en la vico de «Imperiaj urboj» de Maroko — ĝiaj ĉefurboj. Maroko dum sia historio havis **kvar ĉefurbojn**: **Fes**, poste **Marakeŝo**, poste **Meknes** kaj nun **Rabato**.

La **trajnsistemo** en Maroko tre bonas, aktive uzatas de loĝantoj de la lando kaj evoluas — tute unika ekzemplo por Afriko. Mia trajno atingis Marakeŝon preskaŭ nokte. Sed mi rezervis la unuan tranoktejon speciale apud la stacidomo, do post kelkaj minutoj da piediro jam eniris en la hotelon.

La sekvan tagon mi transloĝiĝis de la apudstacidoma urborando en la urbocentron, en **riadon**, kiun rezervis por mi organizantoj de la Mezorianta E-kunveno. **Marokaj riadoj** estas **nacistilaj hoteletoj** kun interna korteto, kutime enhavanta kreskaĵon aŭ fontanon. Kutime ili troviĝas en **medinoj** — **antikvaj partoj de marokaj urboj**. Trovi bezonatan riadon en interplektiĝo de mallarĝaj antikvaj stratetoj estas tre malfacila tasko, des pli ke de strato oni vidas nur iun pordon, ne ĉiam havantan eĉ ŝildon. Kaj ofte tiu pordo troviĝas ie en malgrandaj kaj mallumaj interstratetoj, kiuj debranĉiĝas de amasplenaj pli grandaj vojoj. Tamen, uzante mapon en telefono, **post longa serĉado** mi trovis mian riadon kaj enloĝiĝis. Mi loĝis duope kun partoprenanto el Islando. Baldaŭ post la konatiĝo kaj enloĝiĝo ni startis al kunvenejo.

La Mezorianta kunveno pasis apud Marakeŝo en ekologistile konstruita **vilao Villa Jana**. La nomo de la vilao tradukiĝas «Vilao Paradizo». Ne ĉiuj partoprenantoj ŝatis la situon de la kunvenejo — eksterurban, **atingeblan nur per taksio**, donantan absolute neniun ŝancon vidigi la kunvenon al sporade preterpasanta ekstera publiko, malfaciligantan vizitojn por lokaj esperantistoj (eble, enurbe vespere iuj povus veni, sed ne eksterurbe). Estis ankaŭ alia komplika afero: ne por ĉiuj sufiĉis lokoj en la vilao. Do, parto de homoj loĝis en la vilao, kaj por iom da aliaj homoj la organizantoj rezervis lokojn **en diversaj loĝejoj enurbe**. Pro tio enurbe diversloke loĝantaj partoprenantoj devis kolektiĝi, mendi taksion por matene veni al la vilao kaj vespere reveni en la urbon kaj pagi por tiuj taksio-veturadoj. Se pri situo de la bazejo mi ne emas tro kritiki la organizantojn (eble, malfacilas trovi konvenan ejon, kiu kostus ne tro terure), tamen pri organizado de **transporto** por homoj necesas diri, ke la **organizado tute mankis**. La partoprenantoj devis memstare trakti ĉion kun taksistoj, kaj tio estis tre komplika kaj neagrabla procezo. Tamen, se forgesi pri la taksioj, mi ĝojas, ke mi loĝis en riado en medino. Ja loko estis multe pli nacistila ol tiu vilao. Krome, ni havis eblon **promeni tra la urbo vespere** kaj vespermanĝi en **diversaj restoracioj enurbe**, kio estis pli interesa ol sidi vespere en la vilao.



La aranĝo konsistis el du partoj: **prelega** (la 30-a de marto – la 2-a de aprilo) kaj **ekskursa** (la 3-a de aprilo – la 5-a de aprilo).

Dum prelegaj tagoj la programo okazis en la vilao. **La programo ne estis riĉa**, sed kelkaj prelegoj memorfiksiĝis: prelego de **Mireille Grosjean** pri limoj, primedicinaj prelegoj de **Eduard Kusters** kaj **Frank Lappe**, prelego de **Tatjana Loskutova** pri trasiberiaj karavanoj, **spektaklo** de la internacia dueto **Verda Banano**.

La Mezoriantan kunvenon partoprenis **du rusianoj**: **Tatjana Loskutova** el **Ivanovo** kaj mi el **Moskvo**. **Tatjana rakontis** pri organizataj de ŝi **trasiberiaj karavanoj**, montris bonegan filmon, faritan de unu el karavananoj.

Entute la kunvenon **partoprenis** proksimume **30 homoj** (pli-malpli; mi ne atentis oficialan nombron, se ĝin iu diris). **Ĉeforganizanto** de Mezoriantaj kunvenoj estas **Renato Korsetti**, la nunan kunvenon en Maroko **kunorganizis** (ne perfekte) kune kun li **iu francino**. **Lokaj organizantoj tute mankis**, la organizado ne brilis. Pro tio surloke engaĝiĝis en la organizadon simplaj partoprenantoj, unuavice **Marko Meničetti** el **Italio**, kiu klopodis pri la kaso. Dum ekskursoj ankaŭ **Tatjana Loskutova** ekokupiĝis pri organizaj aferoj.

La ekskursiva parto de la aranĝo konsistis el **tri ekskursoj** dum **tri tagoj**. Bedaŭrinde, dum la ekskursoj ni plene spertis **friponecon de lokaj veturistoj**: ŝoforoj dumvoje kelkfoje pli kaj pli altigis la prezon por sia servo, do la kosto de la ekskursoj (kiu estis fakte kosto de la busetoj) sufiĉe kreskis kompare kun la anticipe afiŝita.



La unua ekskurso estis **al valo de la rivero Urika en la monta regiono Alta Atlaso**, kie apud la setlejo **Seti Fatma** troviĝas belaj **akvofaloj**. La busetoj liveris nin al la setlejo, kie ni tagmanĝis surborde de rivereto. Poste ni **piede supreniris**, gvidataj de loka gvidisto (denove: trovita kaj pripagita de la partoprenantoj) laŭ ŝtonoza vojo kaj atingis pitoreskajn sojlojn sur la rivereto. En tiu ĉi loko la vojo iĝis malfacila, necesis grimpi, kaj plejparto da **homoj revenis**. Nur kelkaj inkluzive min **iris plu** kaj atingis la unuan akvofalon. Onidire, tie estas ankoraŭ kelkaj akvofaloj, sed mi havis nek tempon nek konvenan veston por daŭrigi la grimpadon.

La dua ekskurso estis vizito al la **ĉeoceana kurorta urbo Esaŭiro**. Tie estis **neniu programo**, ĉiuj vagadis laŭ sia plaĉo. Min tre impresis la **Atlantiko**, kiu danke al tre venta vetero havis **grandegajn ondojn**. Mi promenis laŭ la urba plaĝo, poste esploris novan urboparton kaj medinon, kaj fine vizitis la havenan **fortikaĵon** de Esaŭiro. Estis malfacile deŝiriĝi de fotado de la oceano.

La lasta ekskurso denove estis al akvofalo. Ĉi-foje ni veturis **al la plej alta** en Maroko kaj **en la tuta Norda Afriko akvofalo Uzud**. Surloke la ŝoforoj penis proponi al ni gvidiston, kaj parto de la grupo eĉ konsentis. Aliaj homoj jam ellernis efikan metodon de interago kun lokaj gvidistoj: **ignori iliajn proponojn**. Do, ni tute bone esploris la akvofalon memstare. Krom la granda akvofalo tiuloke estis ankaŭ kelkaj malgrandaj, sed la tempo ne sufiĉis por viziti ĉiujn.

Tio estis la lasta tago de la Mezorianta kunveno, vespere mi ĝisis kun aliaj partoprenantoj. Sed mi havis **ankoraŭ tri tagojn** en Maroko. Sekvamatene mi lasis Marakeŝon kaj per trajno komencis vojaĝon **al Fes**. **Fes** estas unu el tiuj urboj kiujn mi antaŭlonge revis viziti.

La **fervojstemo de Maroko** (dume) estas sufiĉe simpla: unu longa linio kun kelkaj branĉoj, kiuj deflankiĝas de ĝi. Marakeŝo estas suda fina punkto de la longa linio. Laŭvoje norden ni traveturas Kasablankan kaj Rabaton, norde venas al Fes kaj fine al Uĝda nord-oriente. Do, **mi devis veturi** de la suda fina stacio **Marakeŝo** al la antaŭlasta granda stacio norde — **Fes**. Daŭro de la seninterrompa vojaĝo estas **8 horoj**, kaj, bedaŭrinde inter Marakeŝo kaj Fes mankas trajnoj kun litlokoj (kvankam, ĝenerale en Maroko estas tri itineroj kun litlokaj trajnoj). Pro tio mi decidis ne veturi seninterrompe la tutan distancon, sidante 8 horojn en la trajno, sed fari **halton en Kasablanka** por iom promeni kaj manĝi en kafejo.



Do, **matene la 6-an de aprilo** mi startis el Marakeŝo kaj vespere alvenis al **Fes**. Ĉi tie mi havis rezervitan hostelon en *medina* kaj jam kutime longe serĉis ĝin. Feliĉe, ĉirkaŭ la 23-a horo mi trovis la hostelon kaj enloĝiĝis. La hostelo estis iom **hibrida kaj ĉarma**: kun ĉambroj, dezajnitaj modernstile kaj kun interna korteto en la stilo de marokaj riadoj.

La tutan sekvan tagon mi ĝuis **Feson**, grimpante sur ruinojn de iu **antikva fortikaĵo** urborande, vagante tra la medinoj (Fes havas eĉ du), rigardante la urbon de sur apuda holmo, vizitante iun ĝardenon, promenante tra la moderna urboparto.



La sekva tago estis la 8-a de aprilo, kaj nokte la 9-an necesis jam forflugi hejmen. Por la 8-a estis planita reveno al la flughaveno de Kasablanka, kompreneble, per trajnoj. Sed mi devis estis en la flughaveno vespere, kaj dum la tago povis viziti ankoraŭ ion. Mi decidis **fari halton** en la **ĉefurbo de Maroko** — la urbo **Rabato**. Tie mi pasigis 4 horojn. Ankaŭ Rabato estas **vizitinda kaj revizitinda**, same kiel la tuta Maroko. Kompreneble, dum 4 horoj mi sukcesis kapti tre malmulton en la granda urbo.



Vespere mi daŭrigis **veturadon al la flughaveno**. La plano estis atingi la flughavenon per la lasta trajno el Kasablanka, kaj ĉi tie la marokaj fervojoj montris ne plej bonan sian flankon: kvankam iliaj trajnoj pli-malpli sekvas la horaron, tamen iam ili **signife malfruiĝas**. Tio draste kontrastas kun Rusio, kie fervojo funkcias kiel horloĝo, kaj malfruiĝo de trajno eĉ je 10 minutoj maloftegas. Mi memoras

nur unu okazon dum multaj jaroj, kiam mia trajno en Rusio senteble malfruiĝis. Malfruvespere en Kasablanka mi sidis en la trajno, kaj ĝi staris kaj staris en la stacio 15 minutojn, 30 minutojn, 45 minutojn... Ĝis la flugo restis nemulte da tempo, kaj mi decidis **ne riski**, atendante plu kiam la trajno finfine ekveturos. Mi eliris, apud la stacidomo **prenis taksion** ĝis la flughaveno kaj iom kure sukcesis al la flugo. Sed por manĝeti en iu kafejo en la flughaveno tempo, bedaŭrinde, jam tute ne estis.

Mi nevolonte forflugis el Maroko: la anticipe ŝatata de mi lando montriĝis vere **tre ĉarma**, kaj neplenaj du semajnoj ŝajnis nesufiĉaj por ĝi. Mi taksas la vojaĝon al Maroko **plene sukcesa**. Ankaŭ **la Mezorianta Esperanto-kunveno estis sukcesa**: malgraŭ multaj malgataĵoj **preskaŭ ĉio planita estis realigita**; mi revidis kelkajn homojn, kun kiuj konatiĝis pasintjare en **Kartvelio**, kaj bone pasigis tempon kun ili, konatiĝante pli proksime; ekkonis kelkajn novajn interesajn homojn.

Grandas probableco, ke mi partoprenos ankaŭ **en sekva MEK**.

NIAJ PROJEKTOJ

LOKALIZU.com

LOKALIZU: teama tradukarto

Nova MASI-projekto

Kara leganto!

Imagu ke vi estas ruso kaj ke vi verkis libron en la gepatra lingvo kaj komencis ĝin vendi. La libro evidentiĝis tiom interesa kaj utila ke ĝin po unu ekzemplero aĉetis ĉiuj kiu povas ĝin tralegi. **Kiom da libroj tiam vi vendus?** Vi pravas, 250 milionojn! Ĉar ĝuste tiom da homoj parolas la rusan lingvon. Kaj nun vi volas pligrandigi debiton.

Kion fari? Evidentas ke necesas traduki la libron al aliaj lingvoj. **Kiom da libroj tiam vi vendus?** En la angla lingvo 800 milionojn, en la hispana — 500, en la ĉina — 1200 ktp.

Sed estas unu tre grava kondiĉo: **kvalito** de la traduko nepre devas esti tia, ke la originalo ne tro ŝanĝiĝu. Krom tio dezirindas, ke ĝi ne tre multekostu.

Jen ĝuste por vi, kara (**kaj baldaŭ mondfama!**) verkisto, estas destinata nia nova projekto **LOKALIZU.COM** — **ŝpara servo de bonkvalita teksttradukado al kelkaj lingvoj samtempe**.

Tiu servo kunigas en la unua flanko **mendantojn**, kiu volas pligrandigi debiton de sia libro (filmo, ludo, lerna kurso, komplika teknikaĵo kun dika instrukcio ktp) kaj en la dua flanko **tradukistojn** kaj redaktorojn.

La servo havas kelkajn **neprajn kondiĉojn**:

- La **minimuma** kvanto de celaj lingvoj estas **kvar**.

- **Mendanto devas** foj-foje respondi demandojn de tradukistoj.

La servo baziĝas sur 5 fundamentaj reguloj:

1) Tradukado ĉiam uzas **Esperanton** kiel pontolingvon.

Tio ebligas ŝpari laborelspezojn. Dank' al simpleco de Esperanto laborelspezo por tradukado el nacia lingvo al Esperanto aŭ male estas proksimume **je 20% malpli** granda ol ĉe kutima tradukado. Tial kiam oni tradukas tra Esperanto samtempe al kvar lingvoj, tiam suma laborelspezo estas egala al rekta tradukado de unu nacia lingvo al kvar aliaj naciaj lingvoj.

2) Al tradukisto estas permesate labori nur kun sia gepatra nacia lingvo kaj Esperanto.

Tio ebligas plian sencan kaj stilan ĝustecon de la rezulta teksto.

3) Ĉiuj tradukistoj, kiuj prilaboras la saman tekston, laboras en unu teamo.

Tio ebligas konsiderinde plibonigi la rezulton, precipe dum kolektiva traktado



de malfacilaj teksteroj.

4) Mendanto ĉiam estas ano de tradukista teamo.

Tio ebligas al mendanto klarigi esencon de dubindaj teksteroj kaj trovi interkonsenton en specialaj kazoj, ekzemple, pri transliterado, tradukado de nomoj kaj kulturaj specialaĵoj, taŭtologioj, sinonimoj, vortludoj ks.

5) Pagadon oni faras per kriptomono.

Tio ebligas tutmondigi kaj senbarigi la pagojn.

Ĉu vi ekinteresiĝis? Legu plu!

05.03.2018

Enkonduka LOKALIZU-kunveno

La 5-an de marto en biblioteko de MEA MASI, kiu situas en la oficejo de la tradukejo «Lingvo Konnekt», okazis **kunveno**, dum kiu oni **pridiskutis** LOKALIZU.COM — **la novan projekton de MEA MASI**. La kunvenon iniciatis **Karter (Aleksandr Basov)**, **aŭtoro de la ideo**. Ni prezentas ĉi tie **protokolon** de la kunveno.

Ĉeestis:

Aleksandr Basov — esperantisto, MASlano, **programisto**, la aŭtoro de la ideo.

Alisa Zingerman (distance) — esperantisto, MASlano, **poligloto**, instruisto de la hebrea lingvo, spertulo pri perinterretaj konektrimedoj.

Aleksandr Basov



Vitalij Vorobjov — inventisto, **ekonomikisto**, programisto.

Vladimir Romanoviĉ — esperantisto, eksMASlano, inventisto, programisto, **spertulo pri kriptomonoj**.

Ilja Muravjov (distance) — esperantisto, MASlano, programisto, **aŭtoro de la projektoj** CATBO.NET, DICT.CATBO.NET.

Kiril Ŝvedov — esperantisto, eksMASlano, la aŭtoro de simila reta peresperanta **traduk-projekto**.

Oleg Ĉajka — esperantisto, MASlano, tradukisto, **redaktoro**, vicdirektoro de la tradukejo «Lingvo Konnekt», gastiganto de la kunveno.

Paso de la kunveno

Enkonduko

Aleksandr rakontis pri la projekto, ĝiaj plej gavaj ideoj, jamaj faritaĵoj, perspektivoj.

Pridiskutoj

Kiril koncize **prezentis** sian projekton kaj ĝustan liston de sferoj kie, laŭ lia opinio, eblas traduki per Esperanto.

Ilja spertigis la kunvenintojn pri malfacilaĵoj dum kreado de **retejo**.

Vladimir iomete forigis nekompetentecon de la ĉeestantoj pri kriptomonoj.

Alisa helpis organizi **distancan ĉeeston** de la du partoprenantoj de la kunveno kaj faris valorajn rimarkojn.

Vitalij nombris bezonatajn por la projekto resursojn.

Oleg disdividis sian sperton pri organizado de traduka agado kaj esprimis **dubojn** pri funkciado de la metodo rilate al garantiado de la kvalito.



Decidoj

Estis decidite **testi** la metodojn de peresperanta tradukado uzante konkretan tekston.

Por la unua provo estis elektita unu el mendoj al la entrepreno «Lingvo Konnekt». La teksto temas pri fotoobjektivo. Ĝin necesis traduki el la rusa al ses lingvoj: la angla, la germana, la franca, la hispana, la ĉina, la araba. La tradukoj al ĉiuj tiuj lingvoj per rekta metodo jam estis faritaj. Tio ebligas **kontrolon** de peresperantaj tradukoj. Ankaŭ la traduko de la originalo al Esperanto kaj ĝia redaktado **jam estas faritaj**.

Nun **estas serĉataj tradukistoj el Esperanto al la celaj lingvoj**.

Paralele oni testas la **kriptomonan pagan** sistemon por la projekto.

Protokolis: Vitalij Vorobjov

Preparis por publikigo: Aleksandr Basov

Redaktis: Marija Verzun, Alisa Zingerman, Irina Gonĉarova, Sergej Straŝnenko

Se **vi volas partopreni la projekton** kiel mendanto, tradukisto, redaktoro, paĝarkreanto, konsilanto, programisto, dezajnisto, administranto aŭ iel ajn, skribu al ni per la kontaktoj en la paĝaro **lokalizu.com**!

NIAJ PROJEKTOJ

Esperanto: Первый Канал

Novaj videoj, aperintaj en **MASI-jutubkanalo** dum aprilo, prezentas diversajn, sed sur nia verda kampo parencajn temojn: la primovadan kaj prilingvan. **Bonvenon al spektado!**

Intervjuo: Valentin Seguru_RET-2017_V8

<https://www.youtube.com/watch?v=JU-OucoAmeU>

Publikigite: **03.04.2018**

La intervjuo kun **Valentin Seguru** estis farita pasintsomere dum **Rusiaj Esperanto-Tagoj** (RET-2017) en Poŝeĥonjo kaj estas la 8-a video el la RET-filmaro. **Valentin Seguru**, aktivulo el la urbo **Ivanovo**, rememoras pri sia Esperanta juneco **fine de 80-aj jaroj**, intercetere pri sia agado kiel estro de junulara komisiono en **ASE** (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj), kiam estis okazigitaj la unuaj internaciaj Esperantaj eventoj **en Sovetio: Renkontiĝo de Pacamikoj en Volgogrado** kaj **Internacia Renkontiĝo de Junaj Esperantistoj en Rostovo la Granda**. Nun Valentin zorgas pri **eternigo de memoro pri Zamenĥof**, esperante donigi lian nomon al iu skvaro aŭ strateto ĉe la loko, kie loĝis **Zamenĥof dum du jaroj studinta en Moskvo**.



Intervjuo: Ĉesko kaj Petro

<https://www.youtube.com/watch?v=YNYEtuYdRoE>

Publikigite: **18.04.2018**

Ĉesko Reale, itala poligloto, gastinta en Moskvo oktobre 2017, intervuas **Petron Fedosov**, la 12-jaran esperantiston. Ili dialogas **en la angla, en la franca, en la rusa, en la latina** kaj **en Esperanto**. Kun evidenta plezuro en flua Esperanto **Petro** rakontas, **kial kaj kiel li lernis Esperanton**.

Spektu ĉe ni ankaŭ la **prelegon** de **Ĉesko "Kiel ellerni multajn lingvojn"**!



NIAJ PROJEKTOJ

Esperanto-Poŝtkruciĝo

25.04.2018

Pli bone malmulte, ol senrezulte

Mirina kaj Markus

Precizigo de la lotum-adresaro

En la aprila letero al la EoPK-aligintoj aperis grava alvoko, celanta precizigon de la lotum-adresaro.

Aprilo estas la unua monato de la dua jaro de ekzisto de nia projekto. La jara sperto montris, ke multaj partoprenantoj estas ĉagrenitaj pro **nericevado de bildkartoj** kaj pro **nescio**, ke iliaj sendaĵoj atingas adresitojn. Tio senentuziasmigas la homojn kaj ili mem **malaktiviĝas** aŭ eĉ **malaliĝas**.

Ni ŝatus **korekti** la situacion. Ni opinias, ke estas pli bone havi mallongan liston da veraj partoprenantoj, ol longan kun nenionfarantaj registritoj. Tial ni proponis al ĉiuj jam aliĝintaj homoj **ĝis la 25-a de majo** konfirmi sian emon plu resti en la projekto. Ni esperas, ke tiu ĉi

precizigo de la lotum-adresaro helpos al la partoprenantoj havi **pli da ekvilibro inter sendataj kaj ricevataj bildkartoj**.

La ellistigitaj personoj ĉiam estas **bonvenaj reveni** — per ordinara nova sinregistro al EoPK. Fine de majo ni havas la interesan **statistikon** pri la konfirmoj kaj malaliĝoj, kiu aperos en niaj **grupoj de vk**: kaj **Fb**.

Krome ni proponas al la homoj, **kiuj ne uzas vk aŭ Fb**, raporti pri sendo kaj ricevo de bk **per letero** al la organizantoj <mailto:bildkarto@gmail.com>.

Ĉe malfacilaĵoj kun interreto bonvenas **arigitaj raportoj**, ekzemple, unu foto pri kelkaj bildkartoj, venintaj dum iu periodo, dezirinde, **kun komentoj**.

PREMIOJ por la unuajaraj EoPK-REKORDULOJ

Ni jam afiŝis en la informfoliaro de **MEA MASI** (“**MiA MASI**” **N4/8-2018**, p.14) kaj poste en Fb la nomojn de **nijaj rekorduloj** — la homoj, kiuj estis **la plej aktivaj dum la unua jaro de la EoPK-ekzisto**. Ni ŝatus substreki, ke la listo ne pretendas esti plena aŭ preciza: ni povis analizi nur respondojn en Fb, kaj tio ne estas plena bildo. Tamen laŭ niaj esploroj formiĝis listo de la plej aktivaj partoprenantoj kaj subtenantoj de EoPK.

Rekorduloj meritas premiojn! Kiel premii homojn enkadre de poŝtkruciĝo? Certe, per kromaj bildkarto! Do, **premiaj bildkartoj** de la organizantoj dum daŭro la dua jaro de EoPK-vivo iros al:

- **po 1 bk** al **Gabriella Stier, Theresia Pyrcherer, Stanislav Kacko, Pascal Vilain**
- **po 2 bk** al **Marina Šerbakova, Zofia Rogalska, P. Neal**
- **po 3** al **Terézia Turányi, Anton Mihelič, Vorto La**
- **4 bk** al **Paul Widzgovski**
- **5 bk** al **Jean-Claude Roy** (telemo)
- **po 12 bk** (**ĉiumonate!**) al **Stefan Knauf, José Rodríguez (Kani), Carolin Weemeyer, Gabriella Stier**

Krome **Stefan Knauf** elektis por si plaĉan libron el proponita 12-titola listo. Li preferis “**Metropolitenon**” de **V. Varankin**. Poste el la sama listo **Kani** elektis “**A.S. Puŝkin en tradukoj de K. Rubljov, Carolin** — “**Ardes**” de **Bonifacij Tornado, Gabriella** — “**Survoje**” de **Klara Ilutovič**.

GRATULOJN al la rekorduloj!!! Multajn belajn bildkartojn al ĉiuj!

02.03.2018

Denove pri la KONKURSO de MARKUS

En la numero 1-2018 de **MiA MASI** (p.12) ni rakontis pri la konkurso, kiun iniciatis **Markus (Jurij Smirnov)** — la teknika organizanto de nia projekto. **Markus** promesis specialajn kondiĉojn por la EoPK-partoprenantoj, kiuj **sendos al li bildkartojn** antaŭ starto de **AMO-Seminario** kaj **APERo-12**, okazigotaj de **Moskva Esperanto-Asocio** fine de februaro-2018. Premie li promesis **gvidlibron pri Moskvo en Esperanto**. La 2-an de marto la premioj estis dissenditaj.

Jen la raporto de **Markus**:

La konkurso finiĝis kaj mi ricevis **16 bildkartojn** de **13 EoPKanoj**. Tri homoj sendis po 1 koverto kun 2 bildkarto. La poŝtaĵoj venis el **Belgio, Portugalio, Germanio** (3), **Hispanio, Meksikio, Romanio, Rusio** (2), **Francio** kaj **Pollando**.

Jen la rezultoj:

- 1. La unua veninta** eksterlanda bildkarto — **Stefan Knauf** el **Germanio**
- 2. La plej bela** bildkarto (mane desegnita!) — **Jose Salguero** el **Hispanio**
- 3. Hazarde** elektita bildkarto — **Jean-François Bettus** (mi ricevis ĝin ĵus!)

Venkintoj, **atendu la libron** en via poŝtkesto!


Dankon al ĉiuj kiuj partoprenis en mia konkurso!

PS: **EoPKanoj, ĉu neniu volas organizi sian konkurson?**



Ni salutu per bildkartoj aperon de nova ZEO!

La **6-an de oktobro-2018** en la franca urbo **Salouël** (ĉirkaŭaĵo de la urbo **Amiens**) okazos inaŭguro de nova **ZEO** (Zamenhof-Esperanto Objekto). Ĝi nomiĝos **Allée de l'espéranto** (Aleo de Esperanto). Kiel informas **Jean-Claude Roy**, la iniciinto de la nomigo, la **300-metojn** longa aleo situas apud la universato de Amiens kaj apud alia aliternejo, do — aldonu ni konklude — ĉiu studento certe ekscios pri ekzisto de nia kara lingvo. Aktivulo de EoPK, **Jean-Claude** petis skribi dankan karton al la urbestro (vidu **MiA MASI № 4 (8)-2018, p.15**). La EoPK-organizantoj faris tion de la nomo de **MEA MASI**.



Tre kara Mirina, mi tutkore dankas MASI pro grava subteno rilate la inaŭguron la 6-an de oktobro en mia urbo de "Allée de l'espéranto" (Aleo de Esperanto). Plie la karto estas belega kaj la urbestro estos tre kontenta! Kaj ne nur la urbestro ĉar mi renkontis oficistinon de tiu urbodomo kiu same aprezas bildkartojn. Kaj ricevo de karto el Rusio dank'al MASI tre gravas por la amikeco inter niaj landoj. Mi estas tre dankema kaj mi sendas miajn plej elkorajn salutojn el Francio.

Jean-Claude Roy



MASlano **Sergej Kuznecov (Forĝisto)** sendis salutleteron al la urbestro de Salouël **Monsieur le Maire** de sia propra nomo. La teksto estas modela. Jen la ekzemplo de private iniciato, montranta konsciigon kaj esprimanta samideanecon kaj pacemon! **Dankon, kara Forĝisto!**

Do, ni vidas, ke ĉiu deziranto povas skribi sian leteron aŭ gratulkarton al la urbestro. Jen la poŝtadreso:

Monsieur le Maire
 Mairie de Salouël
 80480 SALOUËL
 France

Eblas ankaŭ simple sendi al la urbestro **Monsieur le Maire** retmesaĝon:
salouel.mairie@gmail.com

Por la inaŭguro de la **Aleo de Esperanto Jean-Claude** invitis ĉiujn eminentulojn de la regiono. Li kredas, ke bildkartoj el la tuta mondo montros ke nia komunumo estas mondskala kaj Esperanto estas la lingvo de amikeco inter ĉiuj homoj de la mondo.



NIA AMIKA SUBTENO kiel SOCIA HELPO

Mirina

Ekzistas samlingvanoj, por kiuj interŝanĝo de bildkartoj kun esperantistoj estas **grava sociiga kaj amika subteno**. Ekde la starto de EoPK la organizantoj penis **ebligi partoprenon** en la projekto por kelkaj samideanoj, **kiuj ne havas interretaliron. Kiel tio funkcias?** La poŝtadresoj de la personoj estas lotumataj, sed adresoj, al kiuj ili devas sendi bildkartojn, venas retroŝte al mi, mi sendas al tiuj adresoj bildkartojn de mia nomo aŭ/kaj sendas per ordinara poŝto po kelkaj hazardaj adresoj al la prizorgataj partoprenantoj. Tiu sistemo **perfekte funkcias** kun **Klara Ilutoviĉ** kaj **Svetlana Konjaŝova**, kiuj tra tuta tempo estis en kontakto kun mi pri la temo. **Tri aliaj sinjorinoj**, same prizorgataj, montris neniun intereson, do, post la maja precizigo de la adresaro iliaj poŝtadresoj ne plu estos lotumataj.



Kun **Klara Ilutoviĉ**, kiu loĝas en la **apudmoskva urbo Elektrostal**, ni konstante kontaktas telefone kaj foj-foje renkontiĝas en E-klubo. Ŝi regule ricevas bildkartojn, respondadas al ĉiuj, havas de mi novajn adresojn kaj **vere estas tre feliĉa** pro la partopreno. **Klara** estas bonega Esperanta poeto, sed havas **malfortan sanstaton**. Ŝi ne havas familion, kaj **Esperanto estas ŝia sola vivsubteno kaj vivtenilo**.



Kun **Svetlana Konjaŝova** (setlejo **Sanboli** de **Ĥabarovska regiono**) la situacio estis pli komplika: **bildkartoj ne venadis al ŝi**, malgraŭ ke **ŝi diligente sendadis** la kartojn al la adresoj, lotume ricevita de mi kaj liverita al ŝi. Ŝian situacion mi sciis el ŝiaj paperaj leteroj al mi. Do, **mi alarmis pri tiu maljusteco** en la EoPK-grupo. Kaj okazis **miraklo de amika subteno!** Jen kion skribis al mi **Svetlana**, mirigita pri subita drasta ŝanĝo de la situacio:

“Mi ricevis bk-ojn:

25.10.2017 (la unua) de **Ben Tovar** el **USA**, mi sendis la respondan.

En marto 2018 de **Stanislav Kacko** (**Novosibirska regiono**) kaj **Tatjana Belkina** el **Ĉeboksary**. Kaj respondajn de **Denis Petrenko** el **Stavropol** (2 bk).

En aprilo: **Juhasz Istvan** el **Hungario**, **Stefan Knauf** el

Germanio, **Jean-Claude Esperanto** el **Francio**, **Sofia Jefremova** el **Rusio**, **Zsofia Gyorgypal** el **Hungario**. Mi sendis al ĉiuj respondajn.

De **Robert-Lopez-Henshan** (**USA**) venis bk sen rea adreso.

Mi ricevis respondan bk de **Daniel Gubler** el **Svislando**.

Julia Sigmond donacis al mi **sian novan libron** "Steĉjo-Fabeloj", ĝi alvenis hodiaŭ.

Mi ricevis leteron kaj bildkarton, **infanajn desegnajhojn** de **Barbara Niedzwiecka** el **Pollando**. Ankaŭ alvenis bildkarto el **Novgorodo** de **Georgo**.

Mi estas ŝokita pro malavareco de EoPK, kortuŝita kaj multe dankas al ĉiuj!!!

Ankaŭ mi multe ĝojas pro via amika subteno al la virino, **loĝanta en foro de la vastega Siberio** kaj **dum pli ol 30 jaroj** de sia Esperanta vivo **havanta neniujn ŝancojn** praktiki Esperanton kun alilandaj esperantistoj, eĉ konvinkiĝi per propra sperto, ke ili vere ekzistas.

Mi tre fieras, ke foje niaj kunagadoj povas havi humanan efikon, **riĉiĝante vivojn** de la homoj, kiuj estas ne tiom favoraj vivsitacioj, kiel espereble ni ĉiuj. **Koran dankon al vi, karaj samideanoj!**

Sitlejo **Sanboli** (**Ĥabarovska regiono**), kie naskiĝis kaj la tutan vivon loĝas **Svetlana Konjaŝova**.



Fotokolektoj de **Svetlana Konjaŝova**





AMIKA RONDO

VsPLESk-18

29.04-02.05.2018

Mirina

Mi delonge komprenis, ke nomi *VsPLESk*ojn MASI-aranĝo nun estas ioma troigo. *VsPLESk* aperis kiel ruslingva **suplemento de APERoj** kaj multajn jarojn estis organizata de lokanoj (**ivanovaj esperantistoj**) kaj MASI-anoj. Sed dum lastaj jaroj MASI-anoj nek kompletigas la organizan teamon, nek amase vizitas la aranĝon por agrabla ripozo. Nun *VsPLESk* plene **transformiĝis al la aranĝo de IMEA** (*Ivanova Medicinista Esperanta Asocio*) en la personeco de esperantisto **Pavel Volkov** kaj **aktivuloj el Niĵnij Novgorod**; la ĉefa temo estas **sana vivmaniero**, estas ankaŭ klerigaj aranĝoj, kunaj promenadoj kaj ripozo en amika rondo. En tiu ĉi jaro *VsPLESk*on el MASI-anoj partoprenis nur tri homoj: **Scianta, Sindona** kaj mi. Malgraŭ tio *VsPLESk* restas tre grava **aranĝo por MASI-historio** kaj elstara evento por subteno de amikeco inter malnovegaj kaj novaj konatoj. Ĉar **VsPLESk estas ruslingva aranĝo**, ni rakontu pri ĝi **per fotoj**, faritaj de du MASI-anoj.



Fotoj de Mirina




AMIKA RONDO

VsPLESk-18

29.04-02.05.2018

Fotoj de *Scianta (Natalja Ĉistozvonova)*



NIAJ HOMOJ

Aprilaj naskiĝintoj

Ni kore gratulas MASI-anojn, naskitajn en aprilo, okaze de ilia veno al la Tero!

Bonsanon, sukcesojn, progreson, ĝojon, feliĉon kaj neestingeblan esperantemon!

1/ Kiam vi decidis lerni Esperanton, kion vi deziris ricevi.

2/ Kiel vi lernis la lingvon.

3/ Kiel Esperanto ŝanĝis vian vivon / Kion Esperanto alportis en vian vivon.



12.04. Tatjanjo (Tatjana Mojnjakova)

1. Aprile 2017 mi partoprenis la Lingvan Festivalon de poliglotoj "Limbas", kiu okazis en San Antioko, malgranda urbo sur la insulo apud Sardinio en Italio. Dum la festivalo mi malkovris Esperanton, la lingvon, kiu unuigas homojn de la tuta mondo. Mi decidis eklerni la internacian lingvon. Ilja Gнусarev el Penza, Ĉesko Reale el Svislando kaj Liza el Germanio inspiris kaj kuraĝigis min. Somere mi masianiĝis, kaj interesa nova etapo en mia vivo komenciĝis.

2. Mi lernas Esperanton memstare. Lernu.net, la libro kaj la filmo "Gerda malaperis", Informfoliaro de MEA MASI, Esperanto: Первый Канал, videoj en Youtube "La pasporto al la tuta mondo" kaj aliaj helpas al mi lerni la lingvon.

3. Esperanto ŝanĝis mian vivon. Dank'al Esperanto kaj MEA MASI mi partoprenis interesajn eventojn kaj aranĝojn: SES en Slovakio, la lingvan festivalon en Moskvo, AMon kaj APERon. Dank'al Esperanto mi renkontiĝis kaj konatiĝis kun mirindaj, elstaraj homoj.

Esperanto alportis novajn emociojn, defiojn kaj signifon en mian vivon. Mi estas idealisto, kiu volus kredi, ke nia amikeco, unueco kaj kunlaboro helpas rompi limojn inter landoj kaj plibonigi la homaron.



19.04.1973 Oĉjo (Oleg Ĉajka) JUBILEO!



1. Kiam mi komencis lerni E-on (1987), mi jam dum kelkaj jaroj estis elpensanta propran internacian lingvon. Do, mi volis satigi mian intereson, mian scivolemon. Komence pri lingvoj. Poste pri novaj interesaj eventoj, aventuroj, vojaĝoj, homoj.

2. Komence mi konatiĝis kun Eo pere de la revuo. Poste mi lernis la lingvon dum du lecionoj en Baku (la kurso post tio finiĝis pro la militema stato inter Azerbajĝanio kaj Armenio). Posta mia studado de la lingvo estis aŭtodidakta, esplora: mi provadis traduki, legis vortarojn, elprovadis tion en paroloj kaj legado. Aktiva uzado kun diversaj homoj, verkado kaj ludado per la lingvo helpis al mi tre bone lerni ĝin. Kaj poste aperis kaj pli kaj pli influis interreto.

3. Eo plene ĝin ŝanĝis. Mi multege vojaĝis, akiris multegajn amikojn, verkis, manifestiĝis aktive kiel kantisto, poeto, organizanto/aranĝanto. Mi iĝis multe pli komunikema kaj decidema, firma, memfida, senhezita. Miaj horizontoj tre vastiĝis, mi ekhavis multegajn eblecojn.

23.04.2003 Spertanto (Pavel Dolgopolov) 15-jariĝo!

1. Mi decidis lerni Esperanton en la julio de 2017. Estis simpla intereso, mi ankoraŭ ne sciis, kion mi ricevos. Tiam mi "saltis" tra diversaj lingvoj, lernante ilin memstare, kaj neniu el ili mi almenaŭ iom ellernis. Do, Esperanto estas la unua sukcese lernita lingvo.

2. Mi trovis Interrete lernolibron de Boris Kolker, kaj sufiĉe rapide mi ĝin trairis. Tamen plej multe mi ellernis, kiam mi trafis en virtualan Esperantujon (Telegrama grupo "Esperantujo"). Vera komunikado kun realaj homoj el diversaj landoj ege helpis min je la lernado.

3. La unua aĵo kiun al mi alportis Esperanto estis la Lingva Festivalo. Tre forta kaj bonega impreso. Plu estis la partoprenado en Muzikumejo, mi konatiĝis kun kelkaj homoj tiam. Kaj unu homo eĉ iĝis mia vera amiko (espereble mi jam povas tiel diri). Ankaŭ nun per Esperanto mi ekscias diversajn interesegeajn etaĵojn. Ĉefe pri diversaj landoj, lingvoj ktp. Ekzemple, min ĉiam interesis: ĉu tutmonde infanoj komence ne scipovas prononci "r" ĝuste, kaj nur poste lerniĝas? Mi ricevis respondon, ke sama aĵo okazas en Hispanio (almenaŭ). Mirinde, ĉu? Ĉi tiaj aĵoj nur per Esperanto ekscieblas, mi pensas.



NIA VERKARO

Oĉjo jubileas

19.04.1973

En tiu ĉi aprilo *Oĉjo (Oleg Ĉajka)* iĝis 45-jara. Okaze de tiu bela jubileo ni publikigas kelkajn versaĵojn el lia verskolekto “*Ventemo*”.

Oĉjo estas homo absolute speciala – jam ĉar li estas unu el tri nuntempaj anoj de MEA MASI, kiu membras en la klubo ekde la unua tago de ĝia ekzisto (do – dum 23 jaroj + du antaŭaj!). Per sia nemalignorebla karismo, bonkoreco kaj elstara artisteco dum pluraj jaroj li beligis ĉiujn niajn eventojn kaj aranĝojn.

Kara kaj amata Oĉa, ni sincere deziras al vi daŭran esperantemon, aktivadon sur nia verda kampo, multajn novajn poemojn kaj kantojn! Estu feliĉa ĉie, ĉiam kaj kun ĉiuj! Feliĉigu apudulojn! Restu kun via MASI!



Vento povas

Vento povas porti foliojn,
birdojn ĉe aŭroro,
vortojn de mia kanto.
La batojn de mia koro.

Miajn pensojn. Gardeme.
Por neniom perdi dumvoje.
Por resonu via koro treme
kaj la kap' turniĝu ekĝoje.

Vento povas ankaŭ karesi
viajn harojn, vian vizaĝon.
Mi per vento povas adresi
al amata mia mesaĝon.

Mi per ventaj flugiloj leĝeraj
povas vojon senfinan pasi.
Kaj en manoj viaj teneraj
povas mian ventemon lasi.

24.04.2003, 08.02.2004
Moskvo

*

Silentas mia muzo. En angulo
Sur ligna tabureto sidas ŝi.
Kaj la vizi' de mia poezi'
Ĉepordas kun bastono de vagulo.

Surstrate regas ventoj de aŭtuno,
Foliojn pelas lude dis kaj for.
Mi iĝas elemento de l' dekor'
En tiu mondo de malvarma suno.

Jam araneoj sian reton plektas
Sur tiuj manoj, kiuj kreis vin.
Vi estas la real' kaj halucin'.
Perfektas vi, sed min, ho ve, neglektas.

Ĉepordas kun bastono la vagulo.
En la animo lumas malproksim'.
En la profundo senesprimas rim':
Silentas mia muzo en angulo.

2.11.2002
Moskvo

* * *

Vi promenas sub blanka flokaro en via arbar'.
Padojn kaŝis la neĝ', sed vi bone memoras la vojon.
Vi memoras amikojn, dividintajn kun vi tiun ĝojon.
Mi aliĝas al vi festi pinton de ĉi januar'.

Mi veturas en trajn', preterkuras ekstere la vintro.
Niaj vojoj malsamas, sed tion neglektas memor'.
Levu glason da te': trinku ni pri komuna pasinto,
Tamen lasu la lokon en koro por nia estont'.

31.01.2003
Moskvo

* * *

Vi similas al mia muzo –
Vi evitas revidi min.
Tio estas mia destin' –
Esti ekster via fokuso.

Sur ĉielo mi skribis al vi
Vortojn, kiuj naskiĝis ene.
Ilin viŝis matene
La unua suna radi'.

De l' poem' nur ĉapeloj restis,
Ili birde disflugis for.
La vespera aŭror'
Tiujn birdojn al ruĝo vestis.

De la nokto stela tegilo
Kaŝu mian solecon pezan.
Mi forstrekis linion adresan:
Estu dormo mia azilo.

Daŭru tiu nokto sen fin'
Kun la sonoj de venta bluso.
Vi similas al mia muzo –
Vi evitas revidi min.

23.01-1.02.2004
Pirogovskij



PRAKTIKADO

RET-2018



RUSIAJ ESPERANTO-TAGOJ - 2018

Dua informilo

Dato: 01-09 de julio 2018

Loko: urbo **Šujo**, Ivanova gubernio, ripozejo **Daĉa "BOR"**, popola nomo "*Neburĉilovskaja Daĉa*"

Temo: *Generacioj de Esperanto-movado*

Provizora programo: Diskuto pri la ĉefa temo, Somera Universitato, lingvaj kursoj, Instruista seminario, diskutoj, Ronda Tablo pri lingvaj kaj movadaj problemoj, ludoj, kvizoj, koncertoj, ekskursoj, sportumado, libroservo, konkursoj, naĝado, boatado kaj ĉio alia laŭ via plaĉo.

Loĝkondiĉoj: lignaj dometoj kun ĉambroj por 2-3 personoj (kun duŝo kaj necesejo), ĉe bezono eblas aldoni plian liton. Ekzistas unu domo kun oportunaĵoj ekstere. En la ĉefa bona duetaĝa domo ĉambroj por 5-6 personoj, oportunaĵoj en la koridoro.

Prezroj: baza prezo **pro persono/diurno = 1200 rbl** inkluzive **matenmanĝon**. **Aldona lito** en lignaj dometoj (kondiĉe ke ĉiuj bazaj lokoj estos okupitaj) = **800 rbl**; en la domo sen oportunaĵoj = **600 rbl**; en la bona duetaĝa domo = **700 rbl**. Ĉiuj prezroj enhavas **matenmanĝon**.

Manĝado: en la bona domo en la unua etaĝo, **tagmanĝo + vespermanĝo = 500 rbl tage**.

Planataj ekskursoj dum RET:

tra la urbo **Šujo**, vizito de fama produktejo "*Šujskaja vodka*" (kun gustumado), **muzeo de sapo**, landesplora muzeo, leviĝo al la plej alta en la eksa Sovetunio **katedral-kampanilo**, **Nikolo-Ŝartoma monaĥejo**; ekskurso al la **muzeo de K. Balmont**, lia naskiĝloko Gumniŝĉi, lokoj, ligitaj kun lia lernado kaj vivo, literatura vespero dediĉe al li kun partopreno de lokanoj; **vizito al urbeto Paleĥ** – mondkonata centro de produktrado de ikonoj kaj lakaj miniaturoj.

Vetureblecoj: urbo **Šujo** atingeblas per trajnoj el **Moskvo**, **Sankt-Peterburgo**, **Nijnij-Novgorodo**. Nun ekfunkciis de **Kurska stacidomo** (Moskvo) rapida luksa trajno "*Hirundo*", kiu veturas **3 horojn 15 minutojn** kaj haltas en **Šujo**. Bileton (rean) vi povas aĉeti antaŭ 90 tagoj, aĉeto de biletoj al la matena trajno "*Hirundo*" **Moskvo-Ivanovo** dume por datoj post 12.06 ne eblas, poste la ebleco renoviĝos. **Buse el Moskvo** de busa stacidomo **Ŝĉelkovskij**, daŭro ĉ. 6-7 horojn. Eblas veturi trajne kaj buse **ĝis u. Ivanovo**, de kie ĉiujn 20 minutojn veturas busoj al u. **Šujo**.

En **Šujo** ĝis la bazejo eblas preni **taksion**, tempodaŭro 20-30 minutojn, aŭto kostas **200 rbl**. Se kolektiĝos granda grupo, venonta pli-malpli en la sama tempo, estos organizota buso.

Ekzistas **loka buso Šujo – Dunilovo**, funkcia 4-foje tage. Bv. peti halti ĉe **la haltejo Korovino**, post 50 m. estos montrilo "*Daĉa "Bor"*". Maldekstriĝu de la ĉefa ŝoseo kaj paŝu nehaste 1 km. Bonvolu anticipi anonci pri via veno, ni komunikos numeron de la koncerna takso, se vi ĝin bezonos.

Aliĝkotizo kaj partoprenkotizo: aliĝo **ĝis la 15 de majo por REU-membroj** kostas **1200 rbl.**, por **nemembroj – 1500 rbl.** Post tiu dato la kotizo **altiĝos je 100 rbl.** La partoprenkotizon por loĝado dezirindas **antaŭpagi 50% ĝis la 20 de majo**. Por manĝado oni pagos surloke. Ĉiujn pagojn bonvolu ĝiri, transdoni **al la kasisto de REU Aleksandro Lebedev** kun indiko por kiu kaj kiom vi pagas.

Ni atendas kaj antaŭĝojas viajn **kontribuojn por la programo**, dankas vin pro la aliĝo kaj akurata antaŭpago!

Bonvenon al la malnova urbo Šujo, kiu ne lasos vin indiferenta! Vi perfekte ripozos kaj kunprenos parteton de ĝia ĉarmo en viaj koroj kaj animoj!!!



KALENDARO por majo 2018

01.05 – Tago de Laboro

01-02.05 – **VsPLESk-2018**: Pljos, ekde la 29-a de aprilo

03.05 – **Geedziĝo de Gastem kaj Maŝa** (Ilja Muravjov kaj Marija Verzun)

03-05.05 – la 19-a Israela kongreso de Esperanto, Akko

03.05 – **Tutmonda tago de libereco de gazetaro**

05.05 – **Preparleciono antaŭ KER-ekzameno, nivelo B1** (aliaj lecionoj: 8, 12, 14, 18.05)

07.05 – **Tago de radio**

09.05 – Tago de la Venko

09.05 – Naskiĝtago de **Diador Verde** (Artur Grigorjev, esperantistiĝis: 1996, FaRo-40/2014)

10.05 – **Jubileo de Lusja** (Ludmila Vasiljeva, esperantistiĝis: 1989).

13.05 – **starto de maja sumoo** (fino la 27-an de majo)

18.05 – **Internacia tago de muzeoj**

19.05 – **KER-ekzameno**_Biblioteko N 10, 10:30

19.05 – **Lingva Fersivalo en Permo**

21.05 – **Internacia tago de kultura diferenceco por dialogo kaj evoluo**

24.05 – Naskiĝtago de **Lumanta Stelaro** (Jekaterina Lubuŝina, FaRo-8/2003).

24.05 – **Tago de slava skribo kaj kulturo**

Eŭropa tago de parkoj

27.05 – **EOPK**: dissendo de maja informletero kun juniaj adresoj.

25.05 – **Tago de filologo**

26.05 – **Reta Babilejo kun moskvaj esperantistoj**

27.05 – **Maja Rondo de Legado N 5/2018** _ m. "Beljaevo", 16:00.

27.05 – **Tutrusia tago de bibliotekoj** . **Tago de bibliotekisto**

29.05 – Naskiĝtago de **Arina** (Arina Osipova, esperantistiĝis: 2006).

30.05 – Naskiĝtago de **Tanja** (Tatjana Dubinina, u.Saransk, 2017).

30.05 – Polyglot Gathering, Bratislava (ĝis la 3.06)



VIZITKARTO de MEA MASI

Retpoŝta adreso: mirinda.strigo@gmail.com ; +7-905-7966199

Kursoj de Esperanto: mirinda.strigo@gmail.com ; +7-905-7966199

Paĝaro en VKontakte: vk.com/mea_masi

KUNVENOJ

Konversaciaj Rondoĵoj (**KoRo**) kaj Esperantaj parolaj kluboj (**EPoKo**) vk.com/epoko:

alterne, ĉiun 3-an dimanĉon de monato, 17:00-20:00,

kafejo "Mu-mu", str. Arbat, 4 (KoRoĵj),

biblioteko N10, Krasnogvardejskij bulvar, 1, k.1 (EPoKoj)

Rondo de Legado vk.com/rondodelegado:

ĉiun 4-an sabaton de monato, 16:00-20:00, en ies hejmo

NB! Ĉiufoje bezonatas konfirmiĝi pri la tago kaj ejo de la aranĝo!

PROJEKTOJ

Jutubo: Esperanto: **Первый канал**: youtube.com/unua


Esperanto-Poŝtkruciĝo: vk.com/bildkarto

Nova traduka projekto: lokalizu.com

Reta Babilejo: fb.com/groups/1688282294598428

Reta Informfoliaro **MiA MASI**:

miamasi.weebly.com, miamasifoliaro@gmail.com



Esperanta kurso

Faru la Rondon! (FaRo)

vk.com/faru_la_rondon

Vi estas bonvena aliĝi

al ajna **MASI**-projekto

kaj proponi **kunlaboron**,

sinesprimi pri **MEA** aŭ **MiA MASI**,

sendi afiŝindan **foton!**

Viajn materialojn **atendas** la eldonisto

mirinda.strigo@gmail.com